Heinrich Heine,

Ein Fichtenbaum steht einsam

Ein Fichtenbaum steht einsam
Im Norden auf kahler Höh';
Ihn schläfert; mit weißer Decke
Umhüllen ihn Eis und Schnee.

Er träumt von einer Palme,
Die fern im Morgenland
Einsam und schweigend trauert
Auf brennender Felsenwand.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-1023-2072 (2014-05-23 14:24:32)

La poemo troviĝas interalie en `http://www.heinrich-heine.net/haupt.htm`.

Heinrich Heine,

En nord' unu pino

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo;
Glacia kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia,
En unu dezert' orienta,
Eterne pri lando alia
Malgaje sopiras silenta.

Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1023-2073 (2014-05-23 14:27:37)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php`.

Heinrich Heine,

Pinarbo staras sola

tradukita de Friedrich Pillath

Pinarbo staras sola
En nordo sur nuda altaĵ'.
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio
Ĝin kovras blanka litaĵ'.

Sonĝadas ĝi pri palmo
Ĝemanta en orient',
Soleca, sur arda deklivo
En maldolĉega silent'.

Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Friedrich Pillath *(†1932-04.03).*

Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html`.